MARTO 2002

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

# La Espero

2002:1

Komence de majo en Västerås:

## *Jarkunvenoj de SEF, Eldona Societo, ILEI-sekcio Podia diskuto: "Lingvo – via homa rajto" Prelego pri Oomoto kaj esperanto*



## LA ESPERO

***Organ för Svenska Esperantoförbundet***

ISSN 0014–0694
Marto 2001 • 90-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:**
Leif Nordenstorm

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00

**E-post:** *espero@esperanto.se*

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck, Stockholm

**Prenumeration 2002:** 200 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08–34 08 00

**E-post:** *sef@esperanto.se*
**Nätsida:** *www.esperanto.se*

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2002:**
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 – 34 08 00

**Fax:** 08 – 34 08 10

**Postgiro:** 578–5

**Nätsida:** *www.esperanto.se/eldona*

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Ole Hansen


***Manusstopp 31 mars 2002***

**Manus till La Espero**
**sänds till Leif Nordenstorm**
**Järnvägsgränd 11**
**961 76 Boden**
***tel.* 0921-123 54**
***e-post:* nordenstorm@hem.utfors.se**

*La Espero* estas presata sur reciklígita papero.

## NI PREZENTAS

# Gunnar Farm



Gunnar Farm havis sian 50-an naskiĝtagon en la 1-a de februaro. Tial mi faris al li kelkajn demandojn:

*Kie vi naskiĝis? Kie vi nun loĝas?*
Mi naskiĝis en Sundsvall, loĝis kelkaj jaroj en Västerås (kie mi estis sufiĉe aktiva en la E-klubo) kaj nun denove loĝas en mia naskiĝdomo en Sundsvall.

*Pri kio vi laboras?*
Mi havas propran entreprenon: Elfarm AB kie mi plejmulte konstruas elektroniksistemojn por rulseĝoj. Mi antaue laboris ĉe Permobil kaj daure helpas ilin de tempo al tempo.

*Kiajn interesojn vi havas krom Esperanton?*
Mi ludas! Kelkfoje per modelaviadiloj kaj kelkfoje, dumkante, la ukulelon. Diskutoj pri filozofiaj kaj politikajn (mp) temoj kune kun amikoj ankaŭ plaĉas al mi.


*Ĉu vi havas familion?*
Jes, mia edzino Elisabeth kunportis du filinojn kaj ni kune havas du filojn, nun 14 kaj 22 jaraj. La kato Misan ankaŭ apartenas al la familio.

*Kial vi interesiĝas pri Esperanto?*
Mi estas preskaŭ denaska esperantisto kaj tio signifas ke mi havas tre multajn agrablajn memorojn. Mi partoprenis plurajn IJK, ekzemple Fredericia en Danlando, Veliko Tarnovo en Bulgario kaj Raumo en Finnlando. Inter la UK eble tiu en Pekino 1986 estas plej menciinda. Kelkaj KEF:ojn mi ankau ĉeestis kaj someran kurson en Lesjöfors. Por mi la lingvo mem estas sufiĉe valora sed plej valoraj estas la esperantistoj de la mondo. Plurajn de ili mi havis la eblecon ekkoni pere de la bonega Pasporta Servo.

*Ĉu vi havas iajn postenojn en la Esperanto-movado?*
Ne iujn gravajn.

*Ĉu ekzistas aliaj intersaĵoj pri vi?*
Certe, sed ĉu mi ne rajtas havi sekretojn?


**Leif Nordenstorm**



*Vizito en Oomoto-sanktejo*

*Fotis Leif Nordenstorm*

# La japana religio Oomoto



Multaj esperantistoj jam scias ke en Japanio ekzistas religio Oomoto, kiu uzas Esperanton. Multaj esperantistoj ankaŭ vizitis la centron de Oomoto en la urbo Kameoka aŭ legis artikolojn pri vizitoj de aliaj esperantistoj tie. Tamen malmultaj scias pri kia religio estas Oomoto. Se oni legas ekzemple en sveda gimnazia lernolibro pri religio, oni tamen tute ne trovas la vorton "Oomoto". Kial?

Japanio havas ĉirkaŭ 126 milionoj da enloĝantoj. El tiuj ĉ. 80 procentoj konsideras sin budhanoj kaj ĉ. 70 procentoj ŝintoanoj. Eble 15 procentoj estas anoj de la "novaj religioj". Malpli ol du procentoj estas kristanoj. Vi tuj rimarkas ke la sumo estas pli granda ol 100 procentoj. Tiel povas esti ĉar multaj japanoj estas anoj de pluraj religioj. Oomotano klarigis al mi ke fervoraj kredantoj normale apartenas nur al unu religio, sed nefervoraj kredantoj konsideras sin anoj de pluraj religioj. Tiel ili povas partopreni la festojn de pluraj religioj!

La "novaj religioj" estas pli ol kvarcent religioj, kiuj ekestis post la jaro 1800. Multaj estas "sinkretismaj", kio signifas ke ili estas enhavas elementojn de ŝintoismo, budhismom konfuceanismo, taoismo, bahaismo kaj kristanismo kaj ankaŭ okcidentaj ideologioj kiel ekzemple komunismo. Multaj novaj religioj estas fonditaj de virino, kies anoj havas grandan influon el la movado. La novaj religioj plej ofte havas geografian centron, kiu estas templo, templaro aŭ tuta urbo. La plej grandaj novaj religioj estas Tenrikjo kaj Soka Gakkai. Ili menciiĝas en kelkaj svedaj lernolibroj.

Oomoto estas unu el la mezgrandaj novaj religioj. Ĝi fondiĝis en 1892 de la virino DEGUĈI Nao (La unua nomo estas la familia.) La "spiritaj gvidantinoj" de la movado ĉiam estas virinoj. Ekde 2001 la kvina spirita gvidantino DEGUĈI Kurenai ĉefas la movadon. Inter 1900 kaj 1948 tamen ankaŭ unu viro havis gravan postenon. Tio estis la edzo de la dua gvidantino, DEGUĈI Onisaburo, kiu eksciis pri Esperanto kaj enkondukis la lingvon en Oomoto. En 1924 Oomoto komencis eldoni librojn kaj revuojn en Esperanto kaj 1925-1933 oni ankaŭ havis misiejon en Parizo. De tiu loko misiistoj vojaĝis en Eŭropo por propagandi la kredon ke DEGUĈI Onisaburo estas Majtrejo aŭ Kristo, kiu unuigos la mondon. Dum la periodo 1935-1942 Oomoto travivis severajn persekutojn en Japanio, kaj




*Misiistoj de Oomoto en Eŭropo en la jaroj inter la unua kaj dua mondmilitoj*



tute ne povis agadi. Ekde 1950 oni denove eldonas sian revuon Oomoto en Esperanto.

Oomoto havas ĉ. 180000 membrojn, el kiuj 45000 estas aktivaj. Preskaŭ ĉiuj Oomotanoj iom studis Esperanton, kaj ĉ. 1000 vere studis sufiĉe multe por vere uzi la lingvon. Oomoto havas du centrojn en du urboj apud Kioto. En Ajabe estas centro por diservo, kun i.a. la moderna sanktejo Ĉosej-den, kontruita tute el ligno. En Kameoka estas centro por misio. En grandega parko situas oficejoj, gastejoj, lernejoj, presejo, eldonejo kaj sanktejoj.

Arto havas gravan rolon en Oomoto. Oomotanoj volas plibeligi la mondon per arto, kaj opinias ke arto proksimigas homon al dio.

Oomoto-anoj kredas je pluraj dioj. La plej gravaj estas Ookunitokotaĉi, Uŝitora kaj Hicuĵisaru, sed ankaŭ Ludvig Lazar Zamenhof - kla kreinto de Esperanto - estas konsiderata kiel dio laŭ Oomoto. Oomotoanoj tamen opinias ke ĉiuj dioj fakte estas "partaj dioj" de unu sola Mastra Dio. Do, oni samtempe kredas je multaj kaj je unu dioj. Tio ŝajnas komplika afero. Pri tio temos mia disertacio, kiun mi publikigos ĉi-jare.

En septembro mi vizitis Oomoton en Kameoka. Oni tre afable bonvenigis min kaj mian neesperantistan amikon, kiu venis kune kun mi. Ni rajtis loĝi en la gastejo. Je la kvina ĉiumatene nin vekis muziko en laŭtparoliloj, por ke ni certe partoprenu la matenan preĝon je la sesa. Kvankam mi estas kristano, mi volonte partoprenas preĝon ĉe Oomoto, sed mi preferas silente preĝi. Mi havis la eblecon diskuti pri fakuloj pri la doktrino de Oomoto, kaj ankaŭ viziti hejmon de Oomotoana familio.

Ĉu do Oomoto estas memstara religio aŭ formo de ŝintoo? Kelkaj diras "memstara religio", aliaj diras "formo de ŝintoo". Mi dirus "ŝintodevena memstara religio".

**Leif Nordenstorm**

# Vizitoj de eksterlandanoj

Antaŭ multaj jaroj esperantista instruistino el Ĉeĥio vizitis min dum travojaĝo al konferenco en alia urbo en Svedio. Mi renkontis ŝin ĉe la granda aŭtobuso en treege pluva vetero. Mi kunportis du pluvombrelojn kaj tiuj ĉi estis valoraj. Per loka aŭtobuso ni atingis mian hejmon kaj ni havis agrablan vesperon kun manĝado kaj babilado.

La venontan tagon ni vere esperis pli bonan veteron. Sed ne! Kune kun la ombreloj ni busveturis por esplori la centron de Helsingborg. Ni komencis per la malsanulejo kiu estis sufiĉe novkonstruita je tiu tempo. Tiu komplekso tre imponis al mia gasto. Ĝi, ŝi diris, "ŝajnas esti kiel luksa hotelo en mia lando".

Poste ni vizitis nian lernejan muzeon kaj en ĝiaj ĉambregoj ŝi sentis sin kiel hejme, ĉar la malnovtempaj inventarajoj estas la samaj, kiujn ili uzas nuntempe en Ĉeĥio, krom la kanalo kun sablo, en kiu la infanoj komence praktikis skribadon por ne malŝpari skribkajerojn. Sed tiu maniero skribi datiĝas de la fino de la 1800-aj jaroj.

Mi ankaŭ demandis, ĉu ŝi volas vidi etan specialan apartamenton por aĝaj personoj, kiuj ne povas tre bone vivi tute solaj. Proksime loĝis 85-jara esperantistino kiu, mi sciis, ŝatis ricevi vizitojn. Ŝi havis du loĝĉambrojn, kuirejon kaj banĉambron, tiel grandaj ke oni povis eniri kaj turni per rulseĝoj. Kiam la ĉeĥa virino vidis la banĉambron si diris: "Tiu ĉambro ja estas preskaŭ tiel granda kiel mia tuta apartamento hejme."

Nun mi volas rakonti pri alia vizito el fremda lando. Amikino, Ann-Louise, kiu interesiĝas pri la esperantistaj mesaĝoj de la Interreto, vidis ke 19-jara esperantista lernantino, Maria, volis rondveturi en Svedio. Ŝia instruisto rekomendis ŝin, estante diligenta kaj bone edukita, ĝentila knabino. Ŝi venis de Krasnojarsk en Siberio.

Bone, mi diris, mi havas superfluan ĉambron por kelkaj tagoj kaj mi povas montri nian urbon al ŝi. Knabino el Siberio, mi pensis, mi do ne devas tro multe fanfaroni pri nia vivnivelo en Svedio, ĉar tiam si povus esti tre malfeliĉa pri siaj cirkonstancoj en Siberio.

Mi renkontis agrablan, malkaŝaniman knabinon, kiu ne estas fremda al niaj novmodaĵoj, ekzemple komputero, mikro-onda forno ktp. La hejmurbo de Maria situas ĉe la transsiberia fervojo, tri tagnoktoj per trajno el Sankt Peterburgo. La loĝantaro de la urbo estas ĉirkaŭ 870.000 kaj la urbo enhavas dek diversajn industriojn, teatron, muzeon, librejon, universitaton kaj ĉion kion oni povas deziri. La bildoj, kiujn Maria montris, estis de tre belaj kaj modernaj konstruaĵoj. La vetero ne estas multe pli malvarma ol en Sundsvall, en Svedio.

Maria nun studas merkatadon ĉe la universitato, sed ŝi estas konvinkita. ke ŝi ne volas vivi en Ruslando dum la estonteco, kiam ŝi komparas la salajrojn tie, kun la salajroj en aliaj landoj. Povas esti interese aŭdi post kelkaj jaroj kiel ŝia vivo formiĝos. Ni certe tenos la kontakton per kelkaj leteroj. Tamen ŝi havas dudek aŭ tridek leter- kaj komputergeamikojn tutmonde kaj ŝi devas uzi multe da tempo por siaj studoj kaj ne tro da tempo por esperanta korespondado.

Mi deziras bonan feliĉon al ŝi por la futura vivo.

**Barbro Haraldsson**

*Ni esperantistoj ofte renkontas eksterlandanojn. Ĉar Svedio estas unu el la dudek plej riĉaj landoj de la mondo, nin vizitas ofte homoj el landoj kun malpli alta vivnivelo. Tiu ĉi rakonto temas pri tiaj renkontiĝoj. Tiaj renkontiĝoj ne ĉiam estas facilaj. Ĉu ni rajtas demandi ion ajn, aŭ ĉu ni devas eviti humliligi la gastojn per la demandoj? Aŭ ĉu la esperantisto el la malpli riĉa lando ĝenas nin per troaj petoj. Svedo iam diris al mi ke lia korespondanto el alia kontinento jam en la unua letero petis de li tajpilon. Eble vi mem iam spertis tian "malfacilan renkontiĝon", de kiu vi lernis ion novan.*

*Bonvolu skribi al La Espero.*

**La redaktoro**

# Bonvenon al Västerås!



*Arosgården en Västerås, kongresejo por la svedaj esperantistoj*

Komence de majo, la 4-an kaj 5-an, ni jarkunvenos en Västerås, en Arosgården. Okazos la jarkunvenoj de Sveda Esperanto-Federacio, de Eldona Societo Esperanto kaj de la sveda sekcio de ILEI. La KELI-sekcio de SEF aranĝos esperanto-diservon, al kiu ankaŭ la ne-membroj de la sekcio estas bonvenaj. Predikos Leif Nordenstorm.

La ĉefa pukto en Västerås estos podia diskuto, kiu okazos en la sabato, la 4-an de majo. Ni elektis kiel temon "***Lingvo – via homa rajto***", kiun la podianoj prilumos laŭ diversaj vidpunktoj. La enkondukon faros **d-ro Mikael Parkvall** de la Universitato de Stokholmo. La podia diskuto okazos en la sveda. Ne ĉiuj nomoj de la podianoj estas ĝuste nun pretaj, sed estos inter ili kaj pedagogoj kaj politikistoj.

Plia grava punkto estos prelego pri "***Oomoto kaj esperanto***", temo pri kiu doktoriĝas **Leif Nordenstorm**, redaktoro de ĉi tiu gazeto. Lia doktora disertacio aperos ankaŭ libroforme kaj estos, espereble, havebla jam dum la kongreso.

Jam vendredvespere okazos pluraj distraj programeroj. Muzikos i. a. Marina Korot kun geamikoj. Ŝin ni povos aŭdi ankaŭ sabate dum la muzika intermezo kaj vespero. Kunmuzikos ankaŭ la klubano kaj SEF-membro Kaj Stridell, membro de la ĵazgrupo *Trattbandet*.




### Simpla aliĝo

Aliĝkotizo al la kongreso estas 250 kronoj (100, se vi estas SEJU-membro). Por la manĝoj sabate kaj dimanĉe, inkl. kafo, vi pagas nur 280 kronojn, t.e. **sume 530 kronoj.**

Tio validas, se vi estas tre rapida, t.e. se via pago estas farita ***antaŭ la 15-a de aprilo****. Post tiu tago vi devos pagi 100 kronojn pli.

Faru la pagon al **poŝtĝiro 481 43 95 - 2, Esperantokongress.**

### Kie loĝi?

Ekzistas pluraj hoteloj en Västerås, sed ni ne elektis iun specialan. Plej bone estas, ke vi telefonu al Wim Posthuma, kiu prizorgas la hotelmendojn kaj scias, en kiuj hoteloj estas liberaj ĉambroj. Se vi havas propran aŭton vi povas elekti junulargastejon (vandrarhem), kiu estas la plej malmultekosta alternativo.

La telefona numero de Wim estas **021–13 35 29**.

Kion vi atendas? Tuj al la telefono kaj mendu! Muelas unue, kiu ...

## Provizora programo

*Sveda Esperanto-Kongreso*
*Västerås 3 – 5 de majo 2002*

**Vendrede**
(posttagmeze, fruvespere)

| | |
|---|---|
| | alveno, enskribiĝo |
| | interkoniĝo |
| | muzikaj distraĵoj kaj kafejo |

**Sabate**

| | |
|---|---|
| 9.30 – 11.00 | enskribiĝo |
| | kafejo |
| 11.00 –11.45 | jarkunveno de la Eldona Societo Esperanto |
| 11.45–12.30 | jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI |
| 12.30–13.30 | lunĉo |
| 13.30–15.30 | malfermo |
| | podia debato |
| 15.30 | muzika intermezo |
| 16.00–16.30 | kafejo |
| 16.30–18.00 | jarkunveno de SEF |
| 18.30–20.00 | vespermanĝo |
| 20.00 | distra programo |
| | muziko, danco |

**Dimanĉe**

| | |
|---|---|
| 9.00– 9.45 | diservo (laŭ la nova diserva libro *Adoru*) |
| 9.45–10.00 | Kromkunveno de Esperanto-Gården |
| 10.00–11.30 | aŭkcio |
| 11.30–12.00 | kafejo |
| 12.00–13.00 | Leif Nordenstorm: "Oomoto kaj esperanto" |
| 13.00–14.00 | lunĉo |
| 14.00 | fermo |

## Esperanto-Gården

kallar härmed medlemmarna/andelsägarna till extra stämma i Arosgården, Västerås, söndag förmiddag den 5 maj 2002. Ärende: Fyllnadsval till styrelsen.

*Styrelsen*

## Kallelse

Andelsägarna i **Förlagsföreningen Esperanto** kallas härmed till årsstämma 2002, som stadgeenligt kommer att hållas i samband med Svenska Esperanto-Förbundets ordinarie årsmöte.

Tid: lördag 4 maj kl. 11.00.
Plats: Arosgården i Västerås

**Ole Hansen**
ordförande

## DONACOJ

RONDO LANGLET

Göran Dundgren, Stockhom, 100 kr; Leif Nordenstorm, Boden 150 kr. Lennart Sundman, Västerås, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten A. Hannertz, Skogås, 84 kr. (Ĉiumonataj donacoj.)

KLUBO CENT

Alice Johansson, Norrköping, 100 kr.

DOMMASTRO DE ESPERANTO-CENTRO

Börje Andersson, Skövde, monata lukosto por decembro 2000, 3448 kr.

MEMORE AL NILS-ERIK KRISTOFERSON:

Arne Lundkvist, 150 kr.

MEMORE AL MARGIT GUSTAVSSON

Variaj sumoj: Ingrid Ottosson, Vällingby; Börje Andersson, Skövde; Helen Limnell, Enskededalen, Barbro Wallin, Stockholm; Kerstin, Inger, Lena och Ingemar; Karin och Bo; Pontus och Maria; Esperantoklubben i Årjäng; Kerstin Himell, Solna; Maggie och Bengt Persson, Karlstad; Kajsa

# Esperanto-kolekto en tutmonda ekspozicio

Okazis Monda Filatelia Ekspozicio, HAFNIA 01 inter 16-21 10. 2001 en Kopenhago, Danio. Tiun aranĝon partoprenis ankaŭ la kolekto pri Esperanto kaj pri lingva problemo de James Rezende el Brazilio. S-ro Rezende komencis kolekti pri la temo Esperanto tuj post sia esperantistiĝo, en 1988. Post dekjara "kariero" en enlandaj ekspozicioj kaj en Portugalio, ĝi atingis minimuman kondiĉon kaj ekrajtis esti enskribita en mondajn ekspoziciojn, kaj tuj en la unua provo nun, por tiu ĉi aranĝo, ĝi estis akceptita. "Hafnia 01" cetere estis la plej granda filatela evento en la mondo ĉijare kaj estis dediĉita al la 150-jariĝo de la unua dana poŝtmarko.

**El "Retinfo"**

# Himalaja renkonto

La 4-a Internacia Himalaja Renkonto okazas inter 26. 02. - 08. 03. 2002. La celo de la renkonto estas kunigi esperantistojn el la tuta mondo en unika loko por kune babili, vagadi, ferii, ktp.

**El "Retinfo"**

*La kompleta jara listo de E-aranĝoj daŭre aktualigata de ni, troveblas en interreto <http://www.eventoj.hu>*

# Esperanta Vikipedio: Reta Enciklopedio

Ĵus komencis la konstruo de reta enciklopedio en Esperanto! La 'Vikipedio' (vikio + enciklopedio) konstruiĝas kadre de internacia multlingva projekto, per kunlaboro de Interret-uzantoj tra la tuta mondo. La angla versio iniciita de unu jaro enhavas pli ol 20.000 artikoloj! Ĵus iniciita antaŭ kelkaj semajnoj, la esperanta vikipedio estas jam la 6-a plej granda, kun pli ol 200 artikoloj! Ĉiuj povas libere kaj facile partopreni en la konstruo de la enciklopedio. Do tuj partoprenu pri via plej ŝatata temo!

<http://eo.wikipedia.com/>

# Esperanto-kurso en 10 koreaj urboj.

Korea Esperanto-Asocio aranĝis Esperanto-kurson en 10 urboj samtempe.

Laste maskomunikiloj ekinteresiĝis pri Esperanto pro tiu ĉi landskala evento. Prez. de KEA LEE Jung-kee havis intervujon kun 5 amaskomunikiloj, el kiuj troviĝas 2 famaj ĵurnaloj. KEA planas tutlandan renkontiĝon en Feb. en la urbo Iksan.

# 40-jariĝo de Malta Esperanto-Societo

Festante sian 40-jariĝon, la 26-an de decembro 2001, Malta Esperanto-Societo invitis esperantistojn sendi poŝtkartojn kun gratulmesaĝoj, kaj samtempe partopreni konkurson. Pli ol 100 esperantistoj partoprenis. Jen la 3 lotumitaj partoprenantoj kiuj ricevos premion de libroj pri Malto: Veronica Ascadi (Hungario); Ian MacDowall (Britio); kaj Esperanto 3000 (Belgio). La venkintoj baldaŭ ricevos la premiojn. La aranĝoj por festi la 40-jariĝon de la Societo finiĝis per la Zamenhofbankedo, en kiu partoprenis 54 esperantistoj kaj amikoj, inter kiuj du eksterlandaj esperantistoj: s-ino Fukiko Mashimo (Japanio) kaj s-ro Touko Niemi (Finlando)

# Nova Vindozo amikiĝas al Esperanto

'Microsofto' ĵus lanĉis la novan 'Windows XP' kun momo en Esperanto. Unu el ĝiaj plej grandaj modernaĵoj estas la nova surekrana prezento, kiu nomiĝas 'Luna'. La literoj de Esperanto jam venas ene sub 'Unicode' ISO 8859-3 .

# Granda vortaro esperanto-angla

Ĉe *http://hem.passagen.se/hmshm3/vortaro/vortaro.html* eblas elŝuti grandan esperanto-anglan vortaron kun 80.000 vortoj. Ĝi estas uzebla en vindozaj maŝinoj (en makintoŝoj kun vindoza emulilo) kaj eblas serĉi la vortojn en ambaŭ direktoj. Preparis ĝin Björn el la sveda urbo Lerum.

# Unuafoje en Kaliningrad

Malfermante la Zamenhofan Semajnfinon en Kaliningrad, Maksim Kejda emfazis ke ĝi estas la unua internacia E-renkonto en ĉefurbo de la plej okcidenta regiono de Ruslando. Por tiu unuafojaĵo 15-16 dec 2001 en Kaliningrad kunvenis 24 esperantistoj el Litovio, Pollando, Svedio kaj Ruslando.

La sabata programo okazis en la Kulturpalaco de maristoj (eksa borso de Königsberg), ornamita per sloganrubando pri Esperanto. Kadre de seminario pri balta kunlaboro Edward Kozyra (Pollando) kaj Bengt Nordloef (Svedio) prezentis interesajn projektojn, en kiuj planas partopreni ankaŭ esperantistoj el Kaliningrad kaj Klajpeda.

La redaktoro de "La Ondo de Esperanto" prelegis dufoje: pri Gaston Waringhien okaze de ties centa naskiĝdatreveno, kaj pri la eksterlingvaj ideoj de Zamenhof. Krome li rakontis pri Esperanto al la urbanoj, kiuj venis al la seminariejo dank' al gazeta kaj radia informado. La partoprenantoj kaj urbanoj plezure konatiĝis kun okpanela fotoekspozicio farita el la plej interesaj fotoj, senditaj al la Internaciaj Fotokonkursoj de "La Ondo de Esperanto".

Ĉar la ruslandanoj (nur 10) estis malpli multaj ol la gastoj (14), la etoso estis vere internacia, precipe en la sabata vespermanĝo.

Dimanĉe Maksim Kejda promenigis la alilandajn gastojn kaj kelkajn kaliningradanojn tra la urbo de Kantio.

# Pli ol 1 miliono dum 2001

La retejo de Sveda Esperanto-Federacio povis registri 1 037 966 vizitojn dum la jaro 2001, la plej alta kvanto depost la eknombrado en februaro 1996.

**el NUN**

# Mia konvertiĝo

**DONACOJ**
(daŭrigo)

Nordin; Ulla Luin, Tyresö; Lisa Schanning, Bromma; Vera Olsson, Munkfors; Monica och Erik; Lena Nordin; Lena Blomberg, Stockholm; Ole och Kaisa Hansen, Upplands Väsby; Ingemar och Anke Gadman, Hägersta; Christina Rudd; Hultcrantz Jensen Rudd; Okänd.

CETERAJ DONACOJ

Martin Persson, Orsa, 100 kr; Ulla Luin, Tyresö, 500 kr.

Iun tagon oni demandis min ĉu mi volus kunlabori en iu projekto pri indiĝenaj popoloj. Sen scii multe pri la projekto mi jam konsentis, ĉar mi ĉiam estas interesita pri aliaj lingvoj , kulturoj kaj, kompreneble, pri la homoj kiuj apartenas al tiuj kulturoj.

La enterprenantoj de tiu projekto estis prizorgantaj pri la situacio de indiĝenaj popoloj. Pli kaj pli da diverseco en la homara komunumo malaperas. Multaj indiĝenaj popoloj preskaŭ ne povas subteni sian kulturon kaj sian lingvon. La danĝero alvenas, unuflanke, de grandaj enterprenoj kiuj havas monan intereson en la regiono en kiu ili loĝas. Aliaflanke estas la turisma industrio, kiu nuntempe malkovris la indiĝenajn popolojn kiel interesan celon por vojaĝi. Sed ankaŭ la propra nacia registraro sub kiu ili vivas, multfoje ne havas intereson pri iliaj problemoj aŭ neas ke ili bezonas protekton aŭ helpon.

La celo de la projekto estis instrui al ili la uzon de modernaj komunikaj rimedoj. Tiumaniere ili povus interparoli kaj interdiskuti siajn problemojn, lerni unu de la alia kiel trovi solvon por problemoj kaj ankaŭ kune fari proponojn por peti helpon al internaciaj organizoj.

Mi samsentis pri la stato de indiĝenaj popoloj, do, mi tutkore volis kunlabori. Estis nur io kion mi trovis strange. Oni instruis Esperanton por interkomuniki. Mi vere ne sciis multe pri esperanto. Mi sciis ke estas planlingvo, sed mi konis neniun, kiu parolas tiun lingvon. Ankaŭ mi sciis nenion pri kluboj aŭ pri la movado. Mi pensis: kial la esperanta, tiu lingvo ne sukcesis, ĉu ne? Kial oni ne instruas la anglan? Mi ja ne ŝatas la superregadon de io aŭ iu, fakte hodiaŭ la angla estas uzita kiel internacia lingvo.

Jam la duan fojon venis grupo da reprezentantoj de indiĝenaj popoloj al mia lando, Nederlando. Ankaŭ ĉi tiun fojon oni havis grandan problemon kolekti monon por pagi la vojaĝbiletojn kaj la kostojn de instruado kaj de restado dum la tria semajna kurso. La unuan fojon alvenis 24 reprezentantoj el ĉiuj kvin kontinentoj. Nun alvenis 18. Oni volis, dum 5 jaroj, subteni la instruadon kaj la helpon por organizi la indiĝenajn popolojn kaj helpi pri la kreado de propra paĝo en la interreto kaj la ebleco interdiskuti per interreto de iu loko en la mondo. Ili volis ke la organizo kun kiu mi kunlaboris, faru sendependan studon pri la projekto kaj skribu artikolon. Per tiu artikolo ili volus konvinki entreprenojn, naciajn aŭ internaciajn organizojn mone subteni la projekton dum kvin jaroj.

Do mia laboro estis partopreni en klasoj kaj aliaj okazaĵoj, observi la kursanojn kaj instruistojn, fari intervjuojn ktp. Mi tuj komprenis la problemon de la lingvo. La reprezentantoj parolis aŭ la anglan, aŭ la francan aŭ la hispanan kiel pontlingvon. La unuan fojon estis ankoraŭ grupo kiu havis la rusan kiel pontlingvon.

Mi scias kiel instruistino de la hispana kiel malfacile estas por hispanaj parolantoj lerni la anglan kaj prononci bone. Ankaŭ mi scias ke en Sud-Ameriko oni sentas multe la superregon de Usono. Sed tamen, tri semajnoj por lerni komuniki inter ili. Ĉu tio estas farebla?

Mi estis surprizita pri la lernado de Esperanto. La lingvo estas simpla kaj logika kaj la instruado estis tre ĝoja. Ni ne havis tablojn aŭ seĝojn en la lernoĉambro. Ĉiuj sidis sur planko. La muroj estis plenaj de bildoj, vortoj, frazoj ktp. Kiam oni povis eniri en la ĝardenon kaj instrui en natura etoso, oni faris tion. Sufiksojn kaj prefiksojn oni lernis per ludoj. La instruistoj estis bonegaj kaj mi ĝuis. Mi ne estis tie ĉiun tagon, tamen mi lernis ankaŭ iom da Esperanto.

Ekde tiu momento mi sciis ke mi volus lerni tiun lingvon. Mi ricevis kurson de 4 tagoj de instruisto de la projekto. Kaj nun mi estas en la kvarmonata kurso en Karlskoga, ĉar mi volas flue paroli Esperanton.

**Margreet Peschier, Nederlando**

*S-ino Perschier pasintaŭtune studis Esperanton en la Popola altlernejo en Karlskoga.*

# Lingvo-traduka servo

Funkcias interreta tradukilo 'Elitrad' ĉe *http://traduku.net*. Elitrad remontras anglalingvajn retpaĝojn en Esperanto kun la originalaj aspektoj.

La servo anstataŭigas anglalingvajn vortojn kaj frazojn per samsignifaj vortoj kaj frazoj esperantlingvaj. Sekve, la rezulto ne estas vera traduko en norma Esperanto sed nur la angla en aliaj vortoj, kiun ni nomas "antaŭtraduko". Mankas akuzativoj, pluralaj adjektivoj, kaj la verboj plejparte montriĝas kiel radikoj (vid - dir - ven) sen la kutimaj finaĵoj. Esperanto, sed ne kiel ni amas ĝin.

Kaj tamen, la "antaŭtradukoj" estas sufiĉe kompreneblaj kaj jam utilas al la esperantistaro. Dum ni atendas perfektan tradukilon, ni proponas ĉi tiun provizoran servon, promesante ke ni daŭre plibonigos ĝin. Ni sciigos gravajn ŝanĝojn - novajn terminarojn, ĝustigojn ktp — en 'soc.culture.esperanto' kaj la dissendolisto <http://groups.yahoo.com/group/traduku_net>

Kiel la jamaj tradukiloj en aliaj lingvoj, oni povas kaj tajpi/almeti anglalingvajn vorton, frazon aŭ alineojn al Elitrad por tuja traduko, kaj almeti la retadreson (URL) de iu anglalingva retpaĝo al Elitrad por vidi kompletan kopion de la paĝo en (antaŭtraduka) Esperanto.


Elitrad montras siajn antaŭtradukojn laŭ diversaj manieroj ("opcioj"), ekzemple ...

- Unu traduko por ĉiu vorto aŭ frazo.
- Same, sed kun supersignaj numeroj. Metante la kursoron sur numeron, oni legas malsupre de la ekrano alternativajn tradukojn de la koncerna vorto aŭ frazo.
- Plena traduko. Tuj montras ĉiujn alternativajn tradukojn de ĉiuj vortoj aŭ frazoj. Utilas se oni volas redakti la tekston en norman Esperanton.

'Elitrad' estas kunlabora projekto realigata tute per Interreto, fare de:
Aaron Irvine (programado), Carrickfergus, Norda Irlando,
Mike Leon (vortprovizo), Lower Hutt, Nov-Zelando.

**fonto: ret-info**

# Astrid Lindgren kaj Esperanto




## KORESPONDI DEZIRAS

46-jara dommastrino, kiu interesiĝas pri naturo, parkoj kaj kolektas bildkartojn pri parkoj kaj floroj: Vitaliaja Gelucevicieni, Naujoji 20, Daugai, Alytaus raj., Litovio.

Msenwa Mweni-Ake, komencanto, 20-jara;
Kimbweta Mugero, komencanto, 27-jara kaj edziginta;
Alinoti Amanda, 16-jara komencanto kaj lernanto ĉe mezgrada lernejo;
Bukuru & Antionette Ruburaga Nabahena, geedza paro, li prezidanto de klubo.

Ilia komuna adreso estas:
Zilbernik Esperanto-klubo, Nyarugusu rifugejo,
p/a Makere Parish, P.O.Box 72,
Kasulu, Kigoma, Tanzanio

*Astrid Lindgren (1907-2002) eble estis la plej fama verkistino de infanlibroj en la mondo. Ŝia morto estas kialo pripensi ŝian rilaton al Esperanto.*

Dum dudeko da jaroj Astrid Lindgren pere de siaj libroj konigis Esperanton en pluraj landoj. Ekzistas kvar ŝiaj libroj tradukitaj en Esperanton: *Fratoj Leonkoro* kaj *Emilo de Smolando*, tradukitaj de Kerstin Rohdin kaj Harold Brown, *Pipi Ŝtrumpolonga* tradukita de Sven Alexandersson, kaj *Ronjo, rabista filino*, tradukita de Runo Stridell.

Mi kelkfoje renkontis Astrid Lindgren. Ŝi ĉiam interesiĝis pri Esperanto kaj ofte diris al mi ke ŝi deziris esti lerninta Esperanton, kiam ŝi estis juna. Tio povintus okazi, ĉar antaŭ sesdek-sepdek jaroj Olle Olsson (Lund) estis energia Esperanto-instruisto en Vimmerby. Astrid Lindgren kaj la ilustriistino Ilon Wikland donis al mi la rajton uzi la tekston kaj la bildojn senpage. Tio ekonomie ebligis la esperantigon de la libroj. Mi tre interesiĝis pri la verkoj de Astrid Lindgren, kaj krom tradukado de du el ŝiaj libroj mi verkis kajeron pri ŝi kaj ŝiaj verkoj. Mi havis la ĝojon prelegi pri Astrid Lindgren kaj aparte pri la libro *Fratoj Leonkoro* (mia plej ŝatata libro) en pluraj landoj.

De diversaj landoj mi sendis kartojn kaj leterojn al ŝi tiel ke ŝi povu sekvi la vojagon de siaj libroj en esperantaj vestoj tra la mondo. Unu fojon ŝi ricevis dank-karton en la japana lingvo. En septembro mi faris prelegon en Danio de kie aŭskultantoj el pluraj landoj surskribis karton al ŝi.

Lastatempe mi ricevis respondleteron de ŝi – certe unu el ŝiaj lastaj leteroj. Mi posedas 12 leterojn de Astrid Lindgren. En la Reĝa Bilblioteko oni klasifikos ĉiujn leterojn kiujn ricevis Astrid Lindgren. Miaj leteroj pri la esperantigitaj libroj aperos en tiu klasifikado, kiu tiel enhavas referencon pri esperanto.

En la muzeo "Astrid Lindgrens Värld" en Vimmerby estas ekspoziciataj grandformate la esperantaj kovriloj de la esperanto-tradukoj.

Mi ricevis kondolencajn leterojn pri Astrid Lindgren el pluraj landoj. Ni esperantistoj danku al Astrid Lindgren pro ŝia bonkoreco al ni kaj estu ĝojaj ke Pipi, Emil, Jonatan kaj Biskoto daŭrigos siajn esperantajn vojaĝojn tra la mondo ankoraŭ dum multaj jaroj.

**Kerstin Rohdin**

## LIBROJ DE ASTRID LINDGREN EN ESPERANTA TRADUKO

**Astrid Lindgren kaj ŝiaj verkoj.** Kerstin Rohdin. Skövde, 1994. 33 p. 21cm.
Pri la sveda autorino de *Pipi Ŝtrumpolonga* kaj aliaj infanlibroj.
Prezo: 4,80 EUR.

**Emilo de Smolando.** Astrid Lindgren. Trad. H. Brown, K. Rohdin. Motala, 1993. 72 p. 21cm.
Aventuroj de petolega, sed bonkora knabeto. Ilus.
Prezo: 70 SEK

**La fratoj Leonkoro.** Astrid Lindgren. Trad. K. Rohdin. Högsby, 1987. 128 p. 21cm.
Streĉa humanisma rakonto. Ilus.
Prezo: 105 SEK

**Pipi Ŝtrumpolonga.** Astrid Lindgren. Trad. Sven Alexandersson. Motala, 1989. 174 p. 21cm.
La plej legata libro de la fama autorino.
Prezo: 120 SEK

**Ronjo, rabista filino.** Astrid Lindgren. Trad. Runo Stridell. Tyresö, 2001. 163 p.
Elektronika libro elŝutebla senpage ĉe www.esperanto.nu/eLibrejo/

*Mendu ĉe*
*Esperanto-Centro, Vikingagatan 25,113 42 Stockholm*
*sef@esperanto.se*

# Abocolibro por infanoj


*Jon Römmesmo: Esperanto ABC,32 paĝoj. Eldonejo Esperanto, Oslo 2002.8,50 EUR ĉe la eldonejo.*

Aperis abocolibro por infanoj. Por ĉiu unuopa litero estas bildo kaj frazo, ekz. por M: "Maljuna Marteno manĝis multajn migdalojn." La libro estas tre uzebla se oni volas ludi per la lingvo kun denaskaj esperantistoj, aŭ por instrui ĝin al infanoj. Ripetado de amuzaj frazoj estas bona ilo por ripeto.

Bone ankaŭ estas ke ĉiuj bildoj estas kvarkolore presitaj. Malbone estas ke la bildoj ne estas belaj. Ŝajnas ke ili estas pritítaj per malnova komputila printilo, kio fakte malbeligas ilin. Se oni pagas por multekostas kolora presado, oni devus zorgi pri pli bona bildokvalito. Estas ankaŭ eraro en unu el la frazoj. Koko ne "kikerikas" sed kokerikas!

Tamen la libro estas aĉetinda, kaj uzebla.

**Leif Nordenstorm**




# Homeca novelaro

*Lena Karpunina: La bato. Novelaro, 125 paĝoj. Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen 2000. 12 EUR ĉe FEL, 12,60 EUR ĉe UEA.*

De kelkaj jaroj noveloj de Lena Karpunina ricevadas premiojn kaj honorajn menciojn en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 2000 aperis kolekto de 15 noveloj sub la titolo *La bato*.

La stilo de Lena estas simpla kaj glata. Ŝi rakontas laŭ senpera, efika maniero, sen tro detalaj priskriboj aŭ lingvaj komplikaĵoj. En sia rekta maniero ŝi prezentas scenojn kaj situaciojn kiuj impresas tre vere, kredinde kaj realisme. La medio kutime estas inter "simplaj homoj" en la iama Sovetunio. Tamen ne temas pri grizaj, seninteresaj figuroj. Male, Lena montras ke ĉiu homo estas unika kaj koninda. Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.

Lena Karpunina naskiĝis kaj plenkreskis en Taĝikio sed nun vivas en Germanio. Kelkaj el la noveloj en La bato ŝajnas tute aŭ parte membiografiaj. Aliaj prezentas homajn sortojn en la lasta epoko de Sovetunio aŭ en la tempo postsoveta. Preskaŭ ĉiuj baziĝas firme sur bona psikologia realismo. Temo kiu aperas en pluraj noveloj estas la rilato inter infanoj kaj iliaj gepatroj en malfacilaj kondiĉoj. El ili eble La patrino kaj la filino plej emociis min. Ĉiam legante verkon de Lena, oni povas esti certa ke ŝi ne kondamnos aŭ malestimos personojn en la rakonto. Ŝi scias tro bone, ke sub forta premo ni ĉiuj perdas partojn de nia poluro kaj bona konduto. Sed ŝi scias ankaŭ elserĉi kaj montri tiun pecon da homeco, kiu ĉiam restas ĉe ĉiu persono.

Du noveloj en *La bato* prezentas pli dramajn agojn, kiuj impresas ne persone spertitaj. Tiuj rakontoj laŭ mi ne funkcias same bone kiel la ceteraj, tamen ankaŭ ili legindas. En du aliaj noveloj rolas ankaŭ Esperanto, tamen ne kiel ĉefa temo.

Mi tre rekomendas la novelaron de Lena Karpunina. Pro la facila kaj senbalasta lingvaĵo eĉ meza lingvoscio sufiĉas por ĝui ĝin. Kelkaj el la pli mallongaj noveloj eĉ uzeblus kiel legaĵo por konversacia studrondo. Sed dank'al la majstra psikologio ankaŭ pli postulema leganto trovos valoran verkon en la maldika novelaro.

**Sten Johansson**

# "Popularmuziko el Vittula"

La libro "Populara muziko el Vittula" de Mikael Niemi, kiu enhavas ĉapitron pri esperantistoj, nun estas vendita en 600 000 ekz. en Svedio. Dumtempe eldonoj en la finna kaj norvega atingis po 330 000 ekz. Tradukistoj komencis laboron por eldono en la angla. Planoj pri eldonoj estas enkaŭ en Danlando, Germanio, Nederlando, Francio, Italio, Greklando, Hungario, Islando, Ĉeĥio kaj Estonio. La libro aperos ankaŭ en unu el la minoritataj lingvoj de Svedio: la tornevala, parenca al la finna.

Samtempe progresas la laboro pri filmigo de la libro. En februaro okazis provfilmado en diversaj lokoj en Norrbotten. Centoj da knaboj kaj kelkaj knabinoj partoprenis. Multaj el ili devis parkere lerni kelkajn frazojn el la libro en la sveda kaj en Esperanto kaj provaktori antaŭ kamerao. La filmo verŝajne estos preta iam en 2003.



# Malmoderna infano

Ŝi havis ses jarojn, bluajn okulojn, ridis kaj ludis sur la korto antaŭ la vilao. Ŝi plenigis etan sitelon per sablo, bone plenpremis ĝin kaj subite renversis ĝin. Kiam ŝi levis malrapide la sitelon, la sablo staris tie, kiel konuso, alta bulo. Tiam ŝi plenigis denove la sitelon kaj faris novan bulon apud la unua. Mi rigardis ŝian laboron – tio estis plie laboro ol ludo – kaj mi pensis: kiom da miloj da infanoj dum kiom da jarmiloj faris same kiel ŝi per sitelo, ŝovetilo kaj amaso da sablo. Tiurilate la mondo staras senmove.

Okupita de sia laboro, sen alrigardo, ŝi diris al mi:

—Ĉu vi havas nenion por fari hodiaŭ?

—Jes, multe, sed mi ne faras. Ne ĉiam mi povas labori.

—Sed se vi ne laboras, vi ja ne ricevas monon.

—Ne, ĝuste tio estas malagrabla.

—Ĉu vi do ricevas monon de via panjo?

—Ne, mi ne havas panjon.

Iĝis silente kaj jen ŝi daŭrigis:

—Kaj ĉu vi ne edziĝos baldaŭ?

—Mi jam estas edzo.

—Tio ne gravas. Ankaŭ mia panjo estas edziniĝinta, tamen ŝi edziniĝos denove, kaj mia paĉjo same estis jam edzo foje. Nun geedziĝas ĉiu homo ankoraŭ unufoje. Ankaŭ onklino Elsa geedziĝos denove. Ĉu ankaŭ via edzino edziniĝos?

—Mi ne kredas. Almenaŭ ŝi diris nenion pri tio.

Iĝis silente. La knabino daŭrigis sian ludon kaj mi pensis: Kiom da malfacilaĵoj la homoj kaŭzas al si. Kiom da penadoj kaj laboro ili faras al la pastro-oficejoj, juĝejoj kaj al si mem. Ĵus mi renkontis sinjorinon, kiu gratulis min pro mia arĝent-edza datreveno. Ŝi diris:

—Ankaŭ mi kaj Ernesto festis arĝent-tagon.

—Kiel povis tio esti? Vi ja estas geedzoj ne pli ol de kvin jaroj.

—Jes, sed mi estis edziniĝinta dum 12 jaroj kun mia unua edzo kaj Ernesto estis edzo de sia unua edzino dum ok jaroj. Tio estas dudek-kvin.

—Tute ĝuste. Kaj se la dua edzo de la unua edzino de Ernesto kaj la dua edzino de via unua edzo estis jam dum iom da tempo geedzoj, eble ankaŭ ili povas festi arĝentan geedzecon.

—Pro mi volonte. Mi ne enmiksiĝos.

La parencrilatoj povas esti tre mirindaj.

Mi ekpensis pri mia mortinta amiko, la pentristo, kiu kun ne-difinitaj interspacoj kutimis rakonti la jenan strangan historion:

En Anglujo vivis antaŭ multe da jaroj maljuna, nobela sinjorino. Ŝi havis filon kaj sentante la proksimiĝon de sia morto ŝi vokis al si la knabon kaj diris al li:

—Mia kara filo, mi volas konfidi al vi grandan sekreton, kiun mi kaŝis dum multaj jaroj. Mi ne estas via patrino. Mi estas via patro. Via patrino estas la duko de Jork.

Mi rigardis la etan knabinon, ludantan ĉe miaj piedoj kaj pensis: via stato estos baldaŭ tiel konfuza, kiel tiu de la juna anglo. Vi estas infano de la unua geedzeco. Vi jam estas ne-moderna infano. Viaj modernaj gepatroj kreskis super vin. Sed estas ja bone, ke vi povos preterkuri ilin, kiam vi plenkreskos.

La knabino demetis sian sitelon kaj kvazaŭ por daŭrigi la ĵusan temon ŝi diris:

—Kiam mi venos kaj salutos mian paĉjon, ĉu vi ne opinias, ke liaj infanoj pensos, ke estas strange, ke mi nomas ilian paĉjon paĉjo?

—Mi ne scias, sed eble ilia nova panjo havas proprajn infanojn, kiuj jam nomas lin paĉjo kaj do ili jam alkutimiĝis.

Ŝi sidis silenta kaj poste ŝi diris serioze:

—Sed pripensu, mi neniam plu povas ricevi gefratojn –

———

Tiam mi foriris. Oni povis nenion fari pri tiu knabino.

Ŝi estis vere malmoderna infano.

**Hasse Z**

*Tradukis F. Szilágyi*

## UK i FORTALEZA, Brasilien, 3 - 10 augusti, 2002

Anmälningsavgifter (svenska kronor)

| | – 31/3-02 | 1/4 – |
|---|---|---|
| 1. Icke direkt medlem i UEA | 1870 | 2250 |
| 2. Direkt medlem i UEA (ej MG ) | 1500 | 1800 |
| 3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 72-01-01 och 81-12-31), som inte är medlem i UEA | 1120 | 1350 |
| 4 Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA | 750 | 900 |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 81-12-31 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras.

Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-50152

Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto.

**Esperanto just nu**

Finns även som fristående blad
som kan hämtas gratis från
**www.esperanto.se/justnu**

@just nu
*Aktuellt från esperantovärlden*


Nr 3 · 31 januari 2002

## SVENSKA JOURNALEN OM ESPERANTO

*Svenska Journalen* hade i sitt nummer daterat 16 januari 2002 en 4-sidig intervju med Lovisa Gustavsson, ordförande i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund. Den handlar helt om esperanto. Tidningens redaktion fick idén till artikeln efter att ha läst DN:s artikel skriven i samband med E@I-seminariet i Uppsala i början av november.

Svenska Journalen utkommer varannan vecka och riktar sig till en kristen läsekrets. Tidningen chefredaktör nämnde esperanto även i sin personliga spalt.

## "ESPERANTOSYMFONIN" NU PÅ CD



Den amerikanske kompositören David Gaines' första symfoni, även kallad "Esperantosymfoni", eftersom kompositören vävt in i den esperantotexter, har nu kommit ut på CD hos MMC Recording. Man kan beställa skivan på **www.mmcmusic.com**. Förmodligen kommer den att finnas även i skivaffärer som har en god klassisk avdelning, och hos UEA.

Symfonin är inspelad i oktober 2000 i Tjeckien med Mährens Symfoniorkester, med Vit Micka som dirigent och Kimball Wheeler som sångsolist.

Mera om kompositören och hans verk kan man läsa på **www.davidgaines.org**.

## GYLLENE SÅNGER PÅ CD

Från Ryssland kommer två nya CD som innehåller flera av de mest populära sångerna. Kallade "Oraj kantoj" (Gyllene sånger), 1 resp. 2, presenterar dom översättnigar av västerländska "evergreens" och flera originallåtar av de mest kända ryska esperantosångarna. Den första provupplagan på 100 ex. tog slut direkt, men fler är redan på gång att tillverkas och ska kunna beställas på de vanliga ställena (UEA m.fl.)

Båda skivorna tillsammans innehåller 95 minuter musik. En tredje CD med samma titel är planerad.

## AIS HAR HUNNIT BLI 20 ÅR

AIS, Internationella vetenskapsakademin med säte i San Marino, vars huvudspråk år esperanto, har hunnit bli 20 år. Den håller sina veckosessioner i olika länder, ibland t.o.m. i samband med esperantisternas världskongress (undertecknad har varit med på en serie föredrag hållna — på esperanto förstås — av Nobelpristagaren Reinhard Selten). AIS umgås nu med planer att göra sina sessioner längre, gärna i samarbete med fakultet i olika länder.

Undervisningsspråket ska även i fortsättninge i första hand vara esperanto.

## SAGOHÄFTEN SOM TYPEXEMPEL

Franko Luin ombesörjer även sitt företags nätsidor. Som aktiv esperantist har han sett till att dessa finns också på esperanto.

Sidorna vänder sig till fackfolk intresserade av typsnitt. Under januari har han lagt till små häften i pdf-format (samma som e-böckerna). Dessa visar hur olika typsnitt ser ut i praktiken. Sådana häften finns också på esperanto, på **www.omnibus.se/fabelaro/** och innehåller översättningar av flera Grimmsagor.

Franko Luin vill gärna komplettera med fler häften, företrädesvis ur den svenska folksagoskatten. Intresserade som känner till befintliga översättningar, eller som är villiga att översätta en eller några sagor, kan skriva till **franko@omnibus.se**.

## ESPERANTOKURS PÅ DISTANS

Karlskoga folkhögskola erbjuder en distanskurs för nybörjare. Kursavgiften är bara 100 kronor. Det tillkommer en kostnad på 300 kronor för material.

Första omgången pågår under tiden 4 februari — 30 april. Lars Forsman, **lars.forsman@fhsk.karlskoga.se**, kan upplysa om det blir fler omgångar.

## TREVOR STEELE SOM NY VD

UEA meddelar att Trevor Steele börjat på sitt nya jobb som UEA:s VD den 1 januari. Han är organisationens femte VD sedan UEA flyttat till Rotterdam 1955. Han är tillförordnad för ett år och har som sin främsta uppgift att ordna upp relationerna mellan

FÖRENINGSBREV
2002 04 28

Sten Svenonius
Vendelsfridsg 4C
21764 Malmö




Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

styrelsen och huvudkontoret. Som bekant har det rått lite turbulens på den fronten under 2001, bl.a. med avhopp av tre ledande tjänstemän.

## E@I FLYTTAR SÖDERUT

e@i, seminarierna om esperanto på internet, i början SEJU:s projekt, senare övertaget av TEJO, kommer att ha sin tredje omgång i Jugoslavien i slutet av april. Under den omgången kommer man att koncentrera sig till användning av språk på internet. Fler detaljer finns på **www.tejo.org/seminarioj/echei2002_jug.jsp**.

## SNART ETT BRYSSELKONTOR FÖR UEA?

Planerna på ett kontor i Bryssel, EU:s huvudstad, håller på att bli allt mer konkreta. UEA tänker inte lämna Rotterdam för Bryssel, utan öppna ett mindre kontor för att underlätta kontakterna med EU-instanserna. Sedan tidigare har UEA ett kontor i New York, med uppgift att hålla kontakterna med FN och dess olika instanser.

## MONATO FÖRNYAR SIG




Månadstidskriften *Monato*, esperantisternas *Time* eller *Der Spiegel*, har med det nya året satsat på en ordentlig ansiktslyftning. En snygg framsida, sedan länge i färg, en mera genomtänkt layout för insidorna, varav flera i färg, gör tidningen än mer tilltalande. Att den skiljer sig från resten av esperantopressen, genom att i första hand skriva om händelser och företeelser utanför esperantovärlden, gör tidningen unik och oumbärlig.

## TVÅSPRÅKIGT PÅ BUSSTATION I BRASILIEN

Staden Rondnonópolis i Matto Grosso, Brasilien, har invigt en ny busstation den 10 december. Det märkvärdiga med den är att alla skyltar är på två språk — ja även till toaletten.


Förslaget lades fram av den lokala esperantoklubben som fått stöd utifrån (via nätet) av esperantister världen runt.

De tvåspråkiga skyltarna har blivit mycket uppmärksammade i pressen. Resultatet har blivit, att stationens informationkontor börjat fungera även som informationscentral om esperanto.

## LITE GRÖNARE PÅ LÄNSBIBLIOTEKEN?

På ett möte i mitten av januari visade flera länsbibliotek intresse att ingå i projektet "tt-magasinet" som drivs av Stockholms länsbibliotek.

"tt-magasinet" är ett sökbart internetregister över alla tidningar och tidskrifter som finns på biblioteken i Stockholms län (över 5 000 titlar!). I första hand är länsbiblioteken i Örebro län, Västmanlands län och Södermanlands län intresserade att ingå, senare även Värmlands och Dalarnas län.




Den publika delen av "tt-magasinet" är på tre språk, varav det ena är esperanto. Du hittar den på på **www.algonet.se/~tt-mag/**.

## *ESPERANTO JUST NU* I BREVLÅDAN

*Esperanto just nu* lever ett liv oberoende av *La Espero*. Om du vill ha den i brevlådan (ett A4-blad, två sidor text) kan du prenumerera på den, 60 kr för 12 nummer. Betala till pg 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Skriv "Just nu" på postgiroblanketten.

Prenumerationen börjar med nästkommande nummer.